



EKO 2021-15 sendita el Budapeŝto la 21a de aprilo.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## AMO superas ĉion! La pluiro konturiĝas

Okazis AMO 72 en aprilo, gvidita el Irano kun temo "Ŝtopi la Digojn". Ni raportis pri tio en EKO 14, pli poste vi trovos ligan al la prezentaĵo de TEJO.

**AMO 73** sekvas en la 30a de majo (dimanĉo). Ĝi okazos per aktiva kunlaboro kun la grandskale aktiviĝinta faka asocio IKEF, la Internacia Komerca Esperantista Federacio. Temo proponita: 'Komerco favoru esperantistojn'.

**Komentoj por AMO 73:** La ligoj inter komerco kaj aliaj kernaj fakoj evidentas. Kun IFEF, komerco pri fervojaj rimedoj, kun UMEA pri medicinaj kaj aliaj kuraciloj, kun LIBE, pri iloj por blinduloj (kaj pliaj san-defiatioj), kun ISAE pri sciencaj ekipaĵoj, kun ILEI pri edukaj helpiloj. Ĉion tion ni diskutos en la AMO-seminario. Unu neevitebla temo estas la etika flanko de ekonomia agado. En la malesperantisma vivo, tumultas ekonomiaj trompoj kaj ĉarlatanaĵoj. Ni povos (naïve?) imagi, ke en nia verda mondo, tio ne okazu. Sed IKEF devas evoluigi manierojn esplori kaj pripesi iliajn alvokojn kaj projektojn. Tio ege malfacilas, ĉar ni ne falu en la kaptilon mezuri tiujn strebojn el limigita kultura fono. Tempo jam venis por ankaŭ tiu diskuto, kaj por tio AMO estu la podio.

**AMO 74** okazos en la kulturcentro Greziljono, tra du aŭ tri tagoj inter julio 26 kaj 29, depende de la kvanto de kontribuantoj al la temo: 'Kulturo pere de Esperanto'. Arigeblos kontribuoj pri muziko, dramo, arto, manlaboroj, literaturo kaj plio. Aparte valoras la kontribuo de artaj organizantoj.

**AMO 75 kaj plue:** Por AMO seminarioj ekde 75, ni delonge entreprenis aktivajn esplorojn, ĉe UEA mem, ĉe TEJO kaj ILEI kaj ĉe pliaj agantoj. Jam el "plia aganto" unu seminario konkretiĝis ene de du tagoj de la unua kontakto: estas fiksita la dato, la temo kaj eĉ enhavo. La leciono: motivita motoro pli rezulto-donas ol tradiciaj hierarkiaj organizoj, kiuj malfacile decidas kaj eĉ ne respondas!

Do, okazos seminario (numero neasignebla) en sabato la 11a de septembro. Tio ligiĝas al la 9a Eŭropa Kantfestivalo (en la 12a de septembro) kiel raportita en EKO 14. La temo: 'Ni ne perdu junulojn kaj pliaĝulojn dum la kvarentena tempo'. Prelegos

kune Małgosia Komarnicka (Pollando) kaj Svetlana Pogorelaja (Ukranio) ‘Virtuala instruado dum la kvaranteno’. Pliaj kontribuontoj varbotaj.

## Enketilo de Unesko –montru nian deciĉon kaj forton!

UEA petas vin:pleniĝi la demandaron de UNESKO per Esperanto, kaj disvastigi la alvokon ĉe [uea.org/gk/943a1](http://uea.org/gk/943a1). **La limdato: la 30a de aprilo!**

Eblas plie publikigi nacilingve sur naciaj kanaloj la novaĵon, ke ankaŭ Unesko uzas nian lingvon en sia enketo. Ekzemploj el Ĉinio:

<https://www.toutiao.com/i6949709397404779021/>

<https://weibo.com/ttarticle/p/show?id=2309404624740232069191>

<https://zhuanlan.zhihu.com/p/363898856>

[https://mp.weixin.qq.com/s/eriy8-11BQPllxzv\\_OXezA](https://mp.weixin.qq.com/s/eriy8-11BQPllxzv_OXezA)

<https://mp.weixin.qq.com/s/iUh6xzlmUaG6MoBbLAsGLQ>

**Atentu:** Bonvolu uzi **komputilon** por pleniĝi la demandaron, ĉar sur telefono foje en iuj landoj ne aperas la fina butono “**Sendu**”.

Trezoro (Huang Yinbao)

Unesko kontribuas al daŭripova disvolviĝo kaj protektado de endanĝerigitaj lingvoj. Por evoluigi la realigon de la celoj, ekde 1971 ĝis 2015, Unesko trifoje publikigis serion de Tutmondaj Raportoj pri Edukado kaj planas publikigi la novan raporton *Futuroj de Edukado: Lerni fariĝi* (Futures of Education: Learning to Become) en novembro 2021. UEA traktas tion kiel ŝancon por esperantistoj esprimi siajn opiniojn en la tutmonda raporto pri edukado. Tio estos grava ago laŭ la strategiaj planoj disvastigi la idealojn kaj valorojn de Unesko per Esperanto kaj por vidigi al Unesko la utilecon de nia lingvo. Por doni nian kontribuon kaj influon al la Tutmonda Raporto de Unesko, UEA planas sendi al Unesko proponan raporton, laŭ la indikoj de Unesko: *kiel edukado povas esti uzata por formi la futurojn de la homaro kaj la planedo: kio devas esti memorata kaj kio devas esti akcentita pri ĉi tiuj du aferoj*. UEA invitas talentajn esperantistojn sendi siajn proponojn al la dua vicprezidanto de UEA, Trezoro Huang Yinbao [trezoro@qq.com](mailto:trezoro@qq.com) kaj al la ĉefrepresentanto de UEA ĉe Unesko, François Lo Jacomo [francois@lojacomo.eu](mailto:francois@lojacomo.eu) antaŭ la fino de aprilo 2021. La fina propona raporto devas esti maksimume 1000 vortojn longa.


## IJK okazos en Kijivo, Ukrainio

Plejlasta informo de TEJO pri ĝia 77a kongreso, kiu kredeble okazos plejparte virtuale. Datoj laŭ <eventa servo>: julio 26- aŭg 1. Temo: ‘Vojoj al estonteco’. Informoj:

<https://ijk2021.tejo.org/>

Aliĝilo ĉe:

<http://ijk2021.retejo.info/>



## AMO 72 – ILEI ege laboris por sia kontribuo

Jen la filmo pretigita de nia instruista ligo ILEI por la seminario. Pliaj eroj aperos baldaŭ en nia retejo en <aktivulo.net>. En ĝi aperas la prezidanto kaj vicprezidanto de la Ligo. Ni aperigas la ligon ĉar la filmo mem tro pezas por alkroĉita.

<https://youtu.be/q-jh3KoP5IU>

## Libro-oferto de UEA ĝis la monato-monato-fin'



**Ĉio komenciĝis ĉe la Verda**  
*Zaczęło się na Zielonej*

nur  
**7,00 €**  
sesona rabato  
dum aprilo

Dulingva eldono pri Ludoviko Lazaro Zamenhof,  
lia familio kaj la komenco de Esperanto.  
Łódź, 2009 • 100 p. • 24 cm

Universala Esperanto-Asocio <https://katalogo.uea.org>

En la 14-an de aprilo, la mondo memoras la forpason en 1917 de L. L. Zamenhof, iniciatinto de Esperanto. Ĉiuj esperantistoj lin omaĝas per la ĉiutaga uzo, utiligo kaj disvastigo de la neŭtrala lingvo. UEA pro la okazo invitas ĉiujn konatiĝi kun lia historio kaj la komenco de Esperanto per la verko 'Ĉio komenciĝis per la Verda', kun sesona

rabato dum aprilo ĉe la libroservo de UEA (nur 7 EUR): <https://katalogo.uea.org/?inf=8238>.

===== vortoj: 790 =====

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikiloj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikiloj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de marto 2021 (per EKO 2021-12).. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.


**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

**Servo subtenata de  
Universala  
Esperanto-Asocio  
kaj Internacia Ligo  
de Esperantistaj  
Instruistoj**



**Redaktoroj:**  
Stefan MacGill kaj  
Mirejo Grosjean



**ENHAVO**

- AMO ekde 73
- Uneske reagu!
- ILEI en AMO 72
- IJK en Kijivo
- Libro-oferto pri Zamenhof